

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Niaj klasoj

\***erikoj**: gvidas Doi Ĉieko, en la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30. Oni legas nefikciaĵon “Homoj manĝantaj” de Hemmi Yo, tradukitan de Doi Ĉieko.

\***Eseoj**: gvidas Doi Hirokaz, en la Muzeo, en sabato de 14:30-16:30. Oni legas nefikciaĵon “Homoj manĝantaj”.

\***Jokohama Salono**: sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton oni legas “Paradizo Ŝtelita” de Trevor Steele. La 2-an sabaton oni kune legas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni kune

legas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

\***Teksantoj**: gvidas Doi Ĉieko en lundo. Oni nun legas “Kredu min, Sinjorino!” de Cezaro Rossetti.

\***Verse**: gvidas Doi Ĉieko, en la Muzeo. Legata estas “Viktimoj” de Julio Baghy.

\***Daŭriga kurso**: Gvidas Doi Ĉieko en la Muzeo unu kursanon per “Hanako lernas Esperanton”.

\***Elementa kurso**: Gvidas Doi Ĉieko en la Muzeo unu kursanon per “Hanako lernas Esperanton”.

## Korespondo kun lionano

S-ino Murata Kazuyo komencis korespondi kun membro de la Esperanto-klubo de Liono (Lyon), franca urbo ĝemela al Jokohamo. Pri tio raportis la marta n-ro de “Esperanto-Lyon”, tiea bulteno.



## Aŭstralia Radio 3ZZZ legis niajn artikolojn

(apr. 2024)

elsendo de la 22a de aprilo 2024

el Novaĵoj Tamtamas numero 395 “Mia saniga vivmaniero” de Kazuyo Murata

elsendo de la 29a de aprilo 2024

el Novaĵoj Tamtamas numero 393 “pri la 29a de aprilo” el “listo de la feriotagoj en Japanujo” farita de Akiya Hideo

## eĥoj el Aŭstralio

● Mi tutkore dankas vin pro via sendaĵo kaj bedaŭras de ĉi tie ni ne havas tiun plezuron admiri la “sakurojn”

Amikajn salutojn, Franciska

● Karaj samideanoj,

Dankon pro la sendo de via bulteno, kaj grandan sukceson al via laboro por nia nobla celo.  
Trevor Steele



■ Eldonas NPO Esperanto Jokohama ■ Redaktas : Sibayama Zyun'iti, Noriko

■ Adreso: Nagatahigasi 1-19-1, Minami-ku, Yokohama-si,  
Kanagawa-ken, Japanio (JP-232-0072)

■ Redaktejo: tamtamo@eo-jokohama.bona.jp ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-i (Jokohama Esperanto-Rondo)

## eseo

## Sezonaj festoj en nia lando

Itabaŝi Micuko

En nia lando estas kelkaj festotagoj por sezonoŝanĝiĝo. Deveno de tiuj moro baziĝas sur kulturo, kiu envenis en la oka centjaro (laŭ japana erao Heian) de Ĉinio. La epoko daŭris kvarcent jarojn kaj tiutempe nobeloj regis en la lando. Ili akceptis teorion de kvin elementoj de ombro kaj lumo naskitan en Ĉinio, kaj festis multe da sezonaj tagoj en kortego laŭ ĝi.

Poste venis samuraja erao. En epoko Jedo ŝoguna registaro simpligis tiujn festotagojn, kaj oficialigis kvin tagojn. Ili estas jene.

① La sepa de januaro, — oni manĝas kaĉon kun sep herboj por sano.

② La 3a de marto estas tago de knabinoj. Ordinare oni nomas ĝin pupo-festo, kaj familio de knabinoj festas kaj deziras feliĉon de siaj knabinoj.

③ La kvina de majo estas tago de knaboj. Familio de knaboj deziras estontan sukceson de siaj knaboj kaj hisas karpoformajn standardojn. Kial standardo estas karpoforma? Ankaŭ ĝi deveins el ĉina legendo 'nur brava karmo povas fariĝi drako'.

④ La sepa de julio estas festo de steloj. Oni skribas sian deziron sur oblongan paperon nomata *tanzako* (paperfolioj), ornamas sason (unuspeco el bambuoj) per la tanzakoj kaj aliaj paperaĵoj, kaj petas realiĝon de sia deziro al Vego kaj Altairo.

⑤ La naŭa de septembro estas lunotago. Oni deziras ĉion bonan por siaj familianoj.

Nuntempe la kvina de majo restas kiel oficiala festotago por infanoj. Oficiale ĝi ekzistas por ĉiu infano. Tamen oni hisas karpoformajn standardojn laŭ la tradicio.

Geavoj ofte donacas pupojn al nepino kaj karpoformajn standardojn al nepo. Ankaŭ mi donacis ilin al miaj genepoj loĝantaj en Berlino. Sed ne ekzistas infantotago en Germanio. Mia filo hisis tion en naskiĝtagoj de sia filo. Baldaŭ mia nepo estos dekkvinjara. En Germanio oni agnoskas dekkvinjarulon kiel junulon. Tial la standardo jam ne flirtos en la ĉielo.




## sezonvorto maja

## Fabo

Okita Kazumi

Ĝia jadvokoloro sentigas frusomeron al ni. La guŝo de faboj similas al la formo de silkraŭpo. Ĝi aperas en merkato tre mallonge en jaro. Tial fabo estas unu el la malmultaj legomoj, kiuj sentigas alvenon de sezono al ni, en la nunaj cirkonstancoj ke oni povas gustumi ajnan legomon senrilate al sezono danke al disvastiĝo de kultivo en forcejo.



## Prelego

## Esperanto-Muzeo Jokohama (4)

Doi Hirokaz

## Donaco

Pri la granda donaco, kiu ekigis la malfermon de la muzeo, en la komenco mi parolis. Inkluzive de tio, entute ĝis nun ĉirkaŭ 55 milionoj da enoj de 12 homoj bonvolis oferi monon. La muzeo, krom mono ankaŭ ricevis ĉirkaŭ 21 000 donacojn de libroj, dokumentoj kaj objektoj de ĉirkaŭ 50 homoj.

Ankaŭ donacoj de libroj posedataj de forpasintaj familianoj venis de pluraj homoj. Kaj ni ricevis donacojn ankaŭ de eksterlandoj, de Koreio, Ĉinio kaj Ĉeĥio. Mi ŝatus esprimi mian sinceran dankon.



libroj donacitaj de Koreio

Mi aŭdis, ke lokaj agemaj esperantistoj estas petitaj de lasitaj familianoj, kies gepatroj estis esperantistoj. La lasitaj gefiloj deziras donaci librojn al iu. Ĉar Japana Esperanto-Instituto bedaŭrinde nun devas rifuzi akcepton pro manko de spaco, familianoj serĉas alian kompetentan lokon. Ni nun senhezite akceptas aŭ akceptos ilin. La muzeo baziĝas sur la principo akcepti ĉion.

Libroj estu ne nur puraj, sed ankaŭ ne puraj. Eĉ se restas sublinioj por atentigi aŭ enskribitaj rimarkoj sur paĝoj, ĉion ni akceptos. Eĉ ne puraj estas valoraj heredaĵoj. Se nuntempe ekzistantaj libroj estos elvendataj, ĉio perdiĝos, ĉar kvanto da esperantaj eldonaĵoj estas ĝenerale malmultaj kaj ni ne havas kapablon reeldoni ilin. Ni volas ricevi ĉion kaj ni deziras utiligi ilin. Mi ŝatus, ke vi sendu ne nur librojn, sed ankaŭ diversajn dokumentojn kaj materialojn, ĉar ankaŭ ili

perdiĝos, kaj ankaŭ historio kunperdiĝos.

Rezulte de la suprediritaj principoj kolektiĝis multaj duoblaĵoj, Ni ŝatus eldoni liston de duoblaĵoj. Ilin ni publikigos kaj volonte akceptos peton sendi al Esperanto-biblioteko, ankaŭ ĝeneralaj bibliotekoj de la mondo. Ni deziras samajn aĵojn interŝanĝi kun ili. Ni deziras fari etan reciklan rondon.

## Helpe al studado

KAMIMURA Kazumi estas studanto pri la proleta Esperanto-movado en Japanio. Ŝi estas asocia profesoro de la Centro por Lingva Edukado de Ĵoosai-Universitato en la gubernio Saitama. Ŝi prelegis en la 109-a Japana Esperanto-Kongreso en oktobro 2022 en Hachioji, Tokio. Titolo estis “Tempo de konvertiĝo kaj Proleta Esperanto-movado”. Temis pri la proleta Esperanto-movado en 1930-aj jaroj en Japanio. Ŝi unue esploris literaturojn pri la temo, kaj vizitis ankaŭ nian muzeon. La rezulto publikiĝis ĉe la Usona Asocio por Aziaj Studoj en marto de 2022, en Havajo.

En la lasta aŭgusto (2023), en Gent de Belgio okazis kunsido de Eŭropa studasocio pri Japanio. Tie ŝi prezentis pri esperantisto ISIGA Osamu. Nia muzeo liveris studmaterialojn al ŝi.

Ni konsideras la muzeon subteni tiajn esplorojn. Tio estas unu el la ĉefaj misioj de la muzeo.

## Fine

“Ĉu vi scias Esperanton?”, “Jes, mi konas, kio estas Esperanto!” Tio estus konversacio inter esperantisto kaj ordinara urbano de Jokohamo en fora estonteco. Kaj realiĝo de tia interparolo estas nia revo.

En la fino mi esprimas elkoran dankon al s-ino Mireille GROJEAN pro tio, ke ŝi prezentis min al tiu ĉi grava kunveno,

Dankon por via aŭskultado!

(fino)

## 2000-enaj monbiletoj el Germanio


NAMBA Fumiharu

Ekde la 18a de februaro, s-ro André Weber vojaĝis tra Japanio, kaj kiam li atingis la flughavenon Haneda, mi revidis lin kaj gvidis en Jokohamo. André estas mia germana esperantista amiko kiu renkontis en kanada transkontinenta trajno "The Canadian" antaŭ 2 jaroj. Li kaj lia nevino Zofi loĝadis en Jokohamo ĝis la 22a, kaj transiĝis al Kioto. Dum la tagoj en Jokohamo, mi kaj ges-roj Sibayama kune ilin gvidis, havis manĝon, kaj kompreneble trinkis bieron!

Nun, mi prezentu unu epizodon, pro kio mi bone surpriziĝis kaj miris.

Post la tagmanĝo ĉe iu japana restoracio en kvartalo Motomachi, mi kolektis kotizojn por pagi. Tiam, André transdonis al mi 2000-enajn monbiletojn. Tute rare! Mi tre longe, pli ol 10 jarojn, neniam vidis la monbileton! Kial li posedas la biletojn?

Kiel multaj loĝantoj en Japanio konas, la monbiletoj de 2000 enoj preskaŭ ne estas uzataj por kutima afero. Kiam la monbileto aperis en jaro 2000, multaj homoj akiris kaj konservis kiel memoran monbileton por la nova jarmilo. Tamen, bedaŭrinde la nova 2000-enaj monbiletoj ne povis kutimiĝi al civitanoj en Japanio.



2000-ena monbileto el Wikipedia (japana)

André ricevis la biletojn ĉe monŝanĝejo de banko en Germanio. Poste mi rete serĉis kaj trovis similajn personojn kiuj ricevis 2000-enajn monbiletojn ĉe la eksterlandaj bankoj. Supozeble, en landoj de usona dolaro aŭ eŭro, monbiletoj de 20 \$/€ estas tute normalaj por kutima uzado. Tial la bankistoj povas trakti 2000-enajn monbiletojn kiel malrarajn monojn, same kiel 20 \$/€. Oni ricevas ilin en monŝanĝejo, uzas en Japanio, kaj japanoj surpriziĝas pro tiuj raraĵoj... Amuza afero!



Namba Fumiharu kaj André Weber estas en Landmark Tower, Jokohamo

Parenteze, vespere post kiam mi kaj André reiris hotelen, mi sola iris al drinkeja strato Bashamichi, kaj drinkis en mia ŝatata drinkejo. (Verdire mi volis konduki lin al tiu drinkejo, tamen ili jam laciĝis pro la longa vojaĝo, tial mi sola drinkis...) Mi babilis kun la mastrino de drinkejo, kaj prezentis pri la sperto de la esperantaj vojaĝantoj. Fine, tie mi pagis per la 2000-enaj monbiletoj.

Ankaŭ ŝi miris kaj diris. "Mi volas persone konservi tiujn monbiletojn!" Tial, eble la raraj monbiletoj el Germanio estas en tiu drinkejo nun.



La retejo de Esperanto-klubo de Schwerin en Germanio, al kiu apartenas s-ro André Weber <http://www.esperanto-sn.de>